

F 122 Akademiiline Rootsi - Eesti Selts

n. 70

Kuma, Vera

kirj P. Arstale

17. juuli 1938. Tallinn

L l.

Esperanto k.

Tallinn, 17. 7. 38.

Tre estimata singoro!

Do jen hodiaŭ mi finis la laboron. Daŭris tre longe certe, sed mi ne povis fari ĝin pli frue. Mi havis diversajn grupojn kiel turistgvidantino kaj ili forprenis lian da tempo. Krome kiam mi komencis prilabori la materialon, kiun mi kolektis, evidentiĝis ke mi ne klarigis ĉiujn demandojn kaj ne sciis tiom multe ĝuste kaj ĝisfunde kolekti la bezonatan. Do, mi denove ekveturis al Alliklup por du tagoj. Do, post tiom da aventuroj mi tamen atingis la finon de la laboro. Ĉar ĝi estas mia unua tiuspeca, mi estas iom malkuraĝa pri tio, ĉu ĝi fariĝis taŭga, sed mi faris mian plej bonan por fari ĝin tia. Mi jam transskribis ĝin, ĉar mia manuskribo ne estas tro legebla, nur la dialektajn vortojn kaj nomojn mi skribis mane, ĉar en la maŝinalfabeto ne ekzistas ja ĉiuj signoj. Nun pri la kartoj, mi ne estas desegnisto, do kaj pro tio ili ŝajne ne fariĝis taŭgaj, mi eĉ ne scias, ĉu ili estas bezonataj entute. Eble nur la unua, sur kiu estas markitaj la vilaĝoj. Sed por marki ĉiujn aliajn lokojn oni ja bezonas grandegan, tiu montras la 2a karto, mi havas tie nur la duonon de nomoj kaj tamen ĝi jam fariĝis kaĉo. Elombri la vilaĝdomojn estas tute ne

ehle kaj por arbaroj kaj kampoj ne estas loko. Do  
kion fari. Ili dividis la ĉirkaŭaĵojn de Alliklep kaj  
tiujn de Kurkse, sed ĉar tie mi estis tute en la ko-  
menco de ankoraŭ tute malsperta, la materialo  
de tie tute ne estas ampleksa, bedaŭrinde ke mi  
ne povis seni tiu ankoraŭfoje. La kolektitajn  
nomojn mi penis klarigi, sed ne sukcesis ĉi-  
foje kaj tie mi simple diris ĉion. Ili esprimis  
en la priskribo ankaŭ la historietojn kiujn mi  
sanktis al mi pri la unuopaj nomoj, sed mi ne  
sciis, ĉu ili estas bezonataj aŭ ne. Krome mal-  
helpis tre, ke mi ne tiel facile kaj libere povas  
skribi kaj esprimi ĉion svedlingve, ~~ĉar~~ de  
tiu ĉi parto certe eŭhavas lingverarojn. Sed kiel ĝi  
ankaŭ estas por mi mem la laboro estis ege  
interesa kaj mi faris ĝin kun plenkura kaj  
mi estas tre kontenta, ke mi havis ĝin.

Korajn salutojn de la patrino kaj de  
mi!

Verakuma

Endla 52<sup>a</sup> - 6

Tallinn



Mag.

P. Ariste

Tartu

Jakobsoni 8  
Palautettakoon

(asuu Tartossa)

Prof. A. Penttän

Suona

Jyräskele

Suomi

Verakuma, Endla 52<sup>a</sup> - 6  
Tallinn

